
Kurango Luko

numero 18



2-a trimestro 2010

En tiu numero vi legos..

Ĉu vi scias, ke perigordano iĝis reĝo de sudamerika teritorio en 1860 ? D. Baron klarigas tion.	p.1 p.2
J-J Moreau suferas pri stranga malsano, kiun li priskribas.	p.2 p.3
Dank'al la interreto eblas elŝuti librojn (eĉ en la esperanta) kaj legi ilin sur komputila ekrano. Ĉu tio malaperigos la surpaperajn librojn ? demandas Bérangère.	p.3 p.4
Chopin estas la amata infano de la pola muziko. F. Cipriani meditadis antaŭ la urno, kiu konservas lian koron.	p.4
Kiam la filino de amikino donas koncerton honore al Chopin, oni plezure ĉeestas rakontas J. Gaumé.	p.5
J-M Simonet donas al komputiluzantoj 5 valorajn kialojn por uzi liberajn programarojn.	p.6 p.7
Spritaj pripensoj proponas J. kaj G. Layseman.	p.7
Kelkaj membroj jam gustumis la recepton de M. Foucher, ĝi estas bongusta !	p.7 p.8
A. Aude memoras.	p.8

La mirinda historio de perigorda proceduristo

Orélie-Antoine de Tounens estis la duenaskita filo de riĉa kamparano de la vilaĝo de Chourgnac [ŝurnjak], kie li naskiĝis la 12an de Majo 1825.



Orélie-Antoine studis juron kaj laboris kiel aktisto ĉe proceduristo en Périgueux. Li aĉetis poste la oficon de sia estro.

En 1858, je la aĝo de 33 jaroj, li vendis sian proceduristejon, prunteprenis monon de siaj gepatroj kaj foriris en Ĉilion. En tiu epoko, la suda parto de la kontinento estis ankoraŭ sendependa; ĝiaj loĝantoj, la Mapuches aŭ Araucans-indianoj, ĉiam venke rezistis unue antaŭ la inkaoj kaj poste antaŭ la hispanoj; la respublikoj de Ĉilio kaj Argentino ĝuis nenian aŭtoritaton super ili. Proe, Orélie-Antoine decidis krei tie 'Novan Francion', kies reĝo li estos.

Eksterordinara fakto estas, ke tiu revo realiĝis. Dank'al sia aplombo, forto de konvinkiĝo, kaj kuraĝo, la juna perigordano ricevis la aliĝon de la militaj ĉefoj, kiuj proklamis lin reĝo, la 17an de Novembro 1860. Dekreto, subskribita 'Orélie-Antoine la Unua', formis la fundamentojn de konstitucia monarkio. 3 tagojn poste, la Techuelches-indianoj aliĝis al la nova ŝtato: la reĝolando de Arokanio-Patagonio (Araucanie-Patagonie) naskiĝis. Dum 25



jaroj, la standardo blua-blanka-verda de la reĝo ŝvebis super la batalkampoj, kie la popolo malespere luktis kontraŭ la nordaj invadantoj. Orélie-Antoine luktis por la libereco de sia popolo, agante kiel vera monarko: li monfaris kaj aljuĝis ordenojn, kiel 'La reĝa ordeno de la ŝtala krono'.

Malmulte subtenita de

la franca imperio, piktraktita de la gazetaro de sia propra lando, la kompatinda reĝo konis la malliberejojn de Ĉilio kaj Argentino. Elpelita, li trifoje revenis, akceptita de la aklamoj far siaj regatoj. Fine, li reiris Francion, malsana, kaj mortis en 1878 en Tourtoirac, proksime de la vilaĝo, kie li naskiĝis.

Oni povus kredi, ke estis la fino de la reĝolanda historio. Sed, ne ! Antaŭ sia forpaso, Orélie-Antoine la Unua elektis heredonton sur la trono en la persono de Achille Laviarde, kiu do iĝis la reĝo Akilo la Unua. En 1902, Achille mortis. La saman jaron, Ĉilio kaj Argentino partigis Arokanion kaj Patagonion. La reĝolando ĉesis ekzisti. Tamen, pretendanto manifestis sin en la persono de Antoine Cros. La reĝado de Antono la Dua daŭris unu jaron. Lia filino Laure-Thérèse (Laŭra-Tereza la Unua) heredis la tronon. Poste ŝia filo, la princo Jacques-Antoine (Jakobo-Antono la Tria) reĝis en 1916. Fine, de 1952, la princo Filipo la Unua sidas sur la trono de Arokanio-Patagonio. Li estas fora kuzo de Orélie-Antoine.

Malseriozula monarkio, aŭ rajta heredaĵo ? La francaj aŭtoritatuloj elektis: la superinstanca tribunalo de Parizo, la 4an de Junio 1971, agnoskis la princon Filipo la Unua kiel rajtan heredanton de la krono de Arokanio-Patagonio kun la titolo de « Sia Reĝa Moŝto ».

Dominique Baron



Mapuches [mapuŝ]

LA NEKURACEBLA MALSANO DE TANDEMISTO

Rigardinte la retejon de Cent-Montpasejulo, www.centcols.org, mi konstatis plezure la artikolojn verkitajn en Esperanto. Oni renkontas eksternormajn utopiemulojn. Ili raportas, kiel la malsano trafis ilin, ekzemple priskribante la simptomojn pri la « ĉamsindromo », « konsiloj al cent-montpasejulo », « blanka veturado », « la plej alta montpasejo en la mondo ».

La teksto estas bonege verkita, mi ne certas fari tiel bone kiel Cyril, verŝajne malpli bone, sed mi zorgos priskribi, kial mi ŝatas la tandemajn vojaĝojn.

Kiam mi estis juna fraŭlo (cirkaŭ 15-16 jaraĝa), mia najbaro posedis post-militan tandemon, kaj ambaŭ ni ludis la flavbekulojn sur nia rajdobesto dum la semajnfino. La junulinoj rigardis nin. Mi memoras, ke verŝajne ili admiris nin tiel belegaj ni estis ! Tio multege plaĉis al ni. Tiel la tempo pasis, ni estis senzorgaj. Mi bedaŭras tiajn momentojn.

Post mia edziĝo kaj post ŝparegoj, ni acetis nian unuan novan tandemon kaj sen scii, ni estis jam infektitaj de la viruso, iom kiel la ĉamsindromo.

Post la naskiĝo de nia filo, ni ankoraŭ tandemadis, sed tiam, kun nia filo sidanta en korbo ligita sur pakportilo. Ju pli la tempo pasas, des pli la renkontiĝoj kun aliaj tandemistoj oftas, ĉefe post la emeritiĝo, ni renkontas novajn amikojn trafitajn kiel ni de la sammensa malsano.

Ofte ni aŭdas « ŝi ne premas la pedalojn », mi respondas « ni tion scias, sed ŝi pedalas kun mi, kiam vi, via edzino kokrigas vin aliloke », tiam oni povas aŭdi flugi muŝon. Tiuj, kiuj diras tion, ne konas nian ambaŭan plezuron. Povi iri kaj reveni, ĉefe alveni kune kun sia edzino estas plezuro, la peno partigita, k.t.p., neniu atendas nervoze ie la alian, kaj okaze de geedza disputo, necesas trovi la bonan manieron paciĝi.

De post nia ĉirkaŭiro de Francio, laŭ la marbordoj kaj landlimoj, sepmil kilometrojn longa,

la ĉamsindromo trafis nin. Antaŭe, la montaro timigis min, sed nun mi ne timas grimpi dum multaj horoj por transiri multegajn montpasejojn, eĉ La Bonette, la plej alta vojo el Eŭropo, kun pezaj bagaĝoj, entute ducent kvardek kilogramoj ! « tio farindas ! »

Nun mi scias ke, kiam oni volas, oni povas. Ni ne plu kalkulas la transiritajn montpasejojn ĉar « kiam oni amas oni ne nombras ». Ni trairis multe da landoj, transiris la ĉirkaŭmonton el Himalaja, en Kirgizio, ĉirkaŭirante la lagon Issik Kul, ni laŭiris la Volgo-n, la Danubo-n, de Tours ĝis ĝia fonto, kaj poste ĝis la Nigra Maro, ni laŭiris la Manikon, la Nordan Maron. Baldaŭ ni iros de nia hejmo ĝis Sankta-Peterburgo, ni rendevuos kun la anoj el la Tandema Klubo el Rusio, nia Amikaro estante ĝemelita kun la rusoj. La rendevuo okazos en Estonio en Tallin.

Post kelkaj tagoj en Sankta-Peterburgo, ni iros Finlando-n kaj ni revenos ŝipe ĝis Germanio, sur la Balta Maro. Poste ni retrovos niajn rajdobestojn por reveni hejmen. Mi antaŭplanas renkonti esperantistojn. Por ke tio sukcesu, mi sendos retmesaĝojn al ĉefdelegitoj de la trapasotaj landoj.

Por ne plu esti trafitaj de malsanaj mikroboj, tandema kuracisto vakcinis nin per radspoko, malfeliĉe la sindromo recidivadas. KE ĜI VIVU !

Tandemisto kaj novbakita kuŝtriciklanto :


Jean-Jacques Moreau (Johano-Jakobo Moro) : himmosur@wanadoo.fr



Ĉu, iam, la libroj malaperos?


Jam delonge, oni kapablas redukti la volumenon de la libroj, uzante tre maldikan, fajnan sed rezistan paperon, tiel ke, en libro de iom pli ol mil paĝoj, facile enmanigebla kaj legebla, oni povas enmeti tri aŭ kvar "normalajn" librojn ! La kolekto" La Pléiade" estas bona ekzemplo prie. Simpla libroŝranko povas enteni tutan bibliotekon. Certe, tio estas avantaĝo, sed estas malavantaĝo ! Kiam vi legas tiujn librojn, vi ofte misfoliumas la delikatajn paĝojn... kaj vi ne plu komprenas, kion vi legas ... kaj vi blovetas por dispartigi la paĝojn... kaj vi daŭrigas la legadon ĝis la sekvanta interrompo.

Sed nun oni havas novan oportunecon. Oni povas surdisketigi centon da libroj sur unu malgrandan rondaĵon. Estas tre facile retrovi paĝon, eĉ vorton, fari ĉiujn eblajn komparojn kaj analizojn.Tre bone, ĉar, nun, ĉiu havas ekranon por ludi. Sed, ĉu la tiel grandkvante enkomputiligitaj libroj estas legataj? Ĉu por legi aŭ por kolekti? Kaj la illustraĵoj ? Ĉu la desegnoj de DORÉ aŭ la karikaturoj de DAUMIER reliefiĝas sur ekrano kiel sur bona kaj bela papero ?



Rigardi, tuŝi belajn librojn estas ĝuo. Legi bele ledebinditan libron, flari ĝian animalan odoron, tion, la disketo ne permesas. Retrovi amuzan aŭ emociigan paĝon, folumiante la libron, donas ĝuon al la leganto pli ol la manipulado de klavaro. Mi ŝatas la librojn, mi ŝatas legi. Se mi estus riĉa, mi havus tutan ĉambron por ili, kun bretoj ĝis la pla-

fono, kaj moveblan ŝtupareton por atingi la supron !



Mi esperas ke la libroj ne malaperos, por la bono kaj la ĝuo de niaj posteuloj, sed, tamen, mi devas agnoski ke, por la konservado de la homara kulturo, la disketoj estas tre utilaj rondaĵoj.

Bérangère Turbillon

Koro por la muziko

Nenia animo estis pli nobla, pli delikata; nenia spirito pli verva en la gajeco; nenia inteligento pli serioza... Tiel skribis George Sand, memorante sian kortuŝan kaj tumulteman rilaton kun Chopin.



Portreto de Frédéric Chopin far E. Delacroix (Louvre-Paris)

De la granda komponisto kaj pianisto ĉijare datrevenis la naska dujarcentjariĝo. Frédéric Chopin naskiĝis la 22an de februaro 1810 en Żelazowa Wola, apud Varsovio, de franca patro kaj pola patrino. 20-jara, li lasis hejmon kaj ekveturis al Parizo por elaŭdi sian revon kaj gajni famon por sia patrujo. Oni festis la datrevenon en la tuta mondo per aro da Koncertoj, en kiuj Nokturnoj, Baladoj, Sonatoj, Preludoj simbolas ravan vojaĝon en muzika universo markita per melodia kreitaĵo tre sublima. Omaĝo por anĝelo, kiu, laŭ alia teksto de poetino Sand, komponis muzikon, kiu emanis paradizan parfumon. Sed tiu anĝelo havis homan koron kiu estas nun ĵaluze gardata en Varsovio, precize kiel deziris la artisto. La kadavraĵo ripozas en Parizo interne de la tombejo Père Lachaise.



Domo de la familio Chopin en Zelazowa Wola (Pollando)

Okaze de la lasta Esperanto U.K., mi vizitis la ĉefurbon, kies placojn, palacojn, monumentojn, preĝejojn mi admiris. Ĝuste en Sankta Kruco, mi eltrovis la koron de Chopin. Ĝi estas interne gardata en urno fermita en la unua pilastro, maldekstre de la naoso. Mi restis longe pensema antaŭ la epigrafŝtono ornamita per la bareliefa kapo de la artisto, konvinkita ke la koro de Chopin estas ankoraŭ pulsanta kaj pulsados por ĉiam laŭ senmortaj muziknotoj emanigontaj, por la ĝojo de la tutmondaj estimantoj, nekompareblan paradizan parfumon.



Franca Cipriani

Subĉiela koncertejo

Post la U.K. en Bjalistoko, ni revenis al Vasovio akompanate de nia pola amikino Helena. Kiam mi preparis nian vojaĝon mi petis de ŝi rezervon de hotelo en Varsovio, por ke ni havu du tagojn por viziti la ĉefurbon de Pollando. Ŝi perfekte plenigis la peton : helpe de sia filino Maria, ŝi rezervigis por ni ĉambron en loĝejo por muzikstudentoj en kvartalo tute proksima al la malnova urbo. (La du filinoj de Helena estas profesiaj muzikistoj : Maria ludas kaj instruas pianon, Veronika ludas violonon.)



Kiam Helena diris al ni ke Maria donos koncerton dimanĉe posttagmeze en la fama parko Łazienki, kadre de Chopin koncertoj, tuj ni diris ke plezure ni iros aŭskulti ŝin.

Do post la dimanĉa tagmanĝo , Helena vokis taksion ĉar estis malfacile iri per buso ĝis la parko. Alproksimiĝante al la subĉiela koncertejo, ni pli kaj pli laŭte audis la kristalajn notojn, kiuj ekflugis el la piano staranta



sub blanka tendo apud la statuo de la fama komponisto. Multaj personoj sidis sur seĝoj, benkoj,



Jane Pinon, Marie-France Gaumé kaj Helena Szraiber ĉarmataj de la dolĉaj melodioj.

aliaj sur la gazono.



Ĉiuj aŭskultantoj religie silentis, tiuj kiuj devis serĉi lokon aŭ foriri, paŝis diskrete.

Bedaŭrinde de tempo al tempo malkongruaj bruoj malserenigis tiun kvietigan etoson : bicikloturado kun sia brua karavano pasis plurfoje sur la strato antaŭ la parko.



Post la koncerto, Maria ricevas donacojn de admirantoj.

Sincerajn gratulojn al Maria kaj al sia patrino Helena por tiu agrabla posttagmezo.

Jacques Gaumé

10 valoraj kialoj por uzi liberajn programarojn.



1. Por esti libera.

La licencoj de la plejmulto de la neliberaj programaroj estas antaŭelpensitaj por igi interŝanĝon kaj modifon kontraŭleĝaj. La licencoj de liberaj programaroj estas male elpensitaj por garantii kvar liberecojn :

•libereco 1 : la libereco uzi la programaron por iu ajn uzo kaj por ĉiuj ;

•libereco 2 : la libereco studi la funkciadon de la programaro kaj adapti ĝin al siaj bezonoj ;

•libereco 3 : la libereco redisdoni kopiojn de la programaro kaj ties fontokodo.

•libereco 4 : la libereco plibonigi la programon kaj publikigi la modifojn, kiuj profitos al la tuta komunumo.

Konkrete, vi estas libera instali ĝin en komputilon, uzi, kopii, pruntedoni al via najbaro, instali en la hejmon de via bopatro kaj en tiom da komputiloj, kiom vi deziras, en klasĉambron, en administracion, en firmaon aŭ viahejmen … vi estas libera !

Male neliberaj programaroj malrespektas unu aŭ plurajn aŭ eĉ ĉiujn ĉi-suprajn liberecojn.

2. Pro kialoj rilataj al etiko.

Unue, uzi liberajn programarojn estas etika agmaniero. Tio estas volo uzi programarojn, kies celo estas krei komunan havaĵon por la komuna bono, ne programarojn faritajn por servi al privataj interesoj.

Laŭ filozofia vidpunkto, la libera programaro defendas la liberecon kaj samrajtecon por aliri al la novaj teknologioj. La libera programaro ebligas al la uzantoj traduki, plibonigi kaj adapti la programarojn por siaj propraj bezonoj.

Ili ebligas al ĉiuj uzi modernajn programarojn, bonkvalitajn, sekurigajn kaj ĝisdatigitajn, eĉ en malnovaj komputiloj (kiuj havas malmultan memoron kaj malgrandan rezervkapaciton).

La liberaj programaroj estas efika rimedo por daŭre pliigi la aliron al la numeraj teknologioj.

3. Por faciligi la sciodividon

Ĉiuj scias la teoremon de Pythagore : $a^2+b^2=c^2$. Ĉiutage ni uzas objektojn, kiuj ekzistas, ĉar tiu teoremo, kiel multaj aliaj matematikaj teoremoj kaj sciencaj malkovroj, estas libere disponebla kaj uzebla. Sur tiu libera aliro kaj tiu sciodivido baziĝas la disvolviĝo de liberaj programaroj.

La kodo de liberaj programaroj estas malfermita : tio ebligas al la programistoj de la tuta mondo kune labori por proponi la plej perfektajn programarajn solvojn. Per tiu kunlabora procedo, la scio amasiĝas laŭ la maniero de la scienca serĉado. La fontokodo de la programoj estas publikigita. La liberaj programaroj eniras en virtan cirklon de sinsekvaj perfektiĝoj.

Se ni komparas kun kuirarto, eblas diri, ke privata programaro egalvaloras superfrostigitan korbeton, kies recepton ne eblas koni. Ne eblus provi plibonigi ĝin aŭ diveni ties enhavon, kaj estus ankaŭ malpermesite dividi tiun antaŭkuiritan pladon kun siaj amikoj.

Male, kun liberaj programaroj, la tablo estas malfermita : la plado dividiĝas kun tiom da amikoj, kiom oni volas, kaj eblas kontentigi ĉiujn apetitojn, eĉ se oni ne scipovas kuiri. Koncerne la kuiriston, li povas modifi la recepton, plibonigi ĝin, pliproksimigi ĝin al la gusto de la kunmanĝantoj.

La aliro al la fontokodo de la programaro estas nepre necesa, por ke la programaro estu libera. En iuj kazoj, se vi ŝanĝas la saŭcon, endas redoni la recepton : iuj licencoj de liberaj programaroj postulas, ke la verko estu postlasita en la samaj uzokondiĉoj.

4. Por esti sendependa

La disponebleco de la fontokodo de la liberaj programaroj ebligas esti sendependa de la programaro-provizanto. La formatoj de malfermitaj dosieroj ne estas submetitaj al produktsekreto. Tio havas plurajn avantaĝojn :

•se la programaroprovizanto malaperos aŭ ŝanĝos sian oferton, eblas turni sin al alia provizanto, konservante la aktualan teknikan solvon.

•eblas modifi per si mem la fontokodon de la programaro, aŭ laborigi programistojn por aldoni funkciojn aŭ korekti erarojn.

•la uzanto tute regas sian komputikan ĉirkaŭaĵon.

5. Por datenoj sendependaj de la programaroj.

La liberaj programaroj kutime uzas malfermitajn formatojn kaj protokolojn, kies funkciado estas publike konata.

Ilia uzo ebligas al la uzanto ne esti dependa de aparta programaro : li povas libere ŝanĝi ĝin. Sama tekstdosiero povas esti malfermata de pluraj tekstoprilaboraj programaroj (abiword, openoffice...), dum dosiero kun fermita formato ne estas longdaŭra kaj riskas esti neuzebla.

Sekvo en la venonta Turanĝia Luko

Jean-Mary Simonet

P r i p e n s o j

Iam estis kvar personoj, kiujn oni nomis **Ĉiuj** - **Iu** - **Ĉiu** - kaj **Neniu**.
Impona laboro estis farota.
Kaj oni petis de **Ĉiuj** plenumi ĝin.
Ĉiuj estis persvaditaj, ke **Iu** faros ĝin.
Ĉiu povintus fari ĝin, sed reale **Neniu** ne faris.

Iu koleris, ĉar tio estis la laboro de **Ĉiuj** !
Ĉiuj pensis, ke **Ĉiu** kapablas fari ĝin
Kaj **Neniu** pensis, ke **Iu** faros ĝin…

Finfine, **Ĉiuj** riproĉis al **Ĉiu**
ĈarNeniu faris tion, kion **Iu** estus farinta.

Moralo

Sen voli riproĉi tion al **Ĉiuj**
Estus bone, ke **Ĉiu**
Faru tion, kion li devas fari sen esperi
Ke **Iu** plenumos ĝin anstataŭ li…
Ĉar sperto montras, ke
Tie, kie oni atendas **Iu-n**,
Ĝenerale, oni trovas **Neniu-n**.

✓*Pripenso de Jean-Louis BRUNET ricevita internete de Monique GAULT (La Blottière, 49 LA POMMERAYE).*

Jeannine kaj Gérard Layseman

VERDA KRUDA KREMAĴO

Konsilinde uzi bionutraĵojn

- ½ aŭ 1 glaso da akvo
- 1 supkulero da grajnoj de kukurboj trempitaj dum 12 horoj

Miksi unufoje

Poste aldonu :


- 2 aŭ 3 pomojn pecigitajn kun la ŝelo
- ½ aŭ 1 bananon
- 1 ripon da celerio
- 4 aŭ 8 grandajn manplenojn da spinacoj aŭ betfolioj, petroselo, verda salato.
- 1 ajleron
- Pipron, kurkumon, zingibron en egala kvanto laŭplaĉe
- 1 supkuleron da oleo malvarme premita

Tiu preparaĵo farita matene povus esti manĝata ĝis vespere sen difektiĝi dank'al la ĉeesto de fibroj.

Konsilinde manĝi kun ĝermitaj grajnoj da luzerno.

Sekvo paĝo 8

Solvo de la ludo proponita en T.L. 17



NOTOJ :

1. Se la kremaĵo estas tro densa, aldoni akvon.

2. Se ĝi estas tro likva, kreskigi la kvanton da grajnoj de kukurbo.

3. Uzi potencan miksilon por havi oleecan kremaĵon.

BONAN APETITON !

Recepto proponata de Madeleine Foucher

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

Amuza sperto dum kongreso

Dum la Universala Kongreso de Varsovio en la jaro 1959, iam mia edzino estis laca kaj deziris ripozi. Do interkonsentite, post la tagmanĝo ŝi restis en la ĉambro kaj mi vagadis en la urbego. Kun miro mi vidis amason da homoj borde de la trotuaroj, eĉ multaj kun florbukedoj, malfacile mi sukcesis ekscii kio okazas, kaj mi komprenis, ke ili atendas la alvenon de la usona vicprezidento. Fakte nelonge poste kvarreakcia jetaviadilo larĝe ĝiris super la urbo, sed, mi ne venis en Pollando por vidi la usonan vicprezidenton, kaj mi daŭrigis mian vagadon.

Estis varme, mi soifis. En Varsovio, almenaŭ tiam, oni ne trovis trinkejon je ĉiu stratangulo kiel en la francaj urboj ; post longa serĉado mi sukcesis trovi trinkejon en kiu svarmis homoj, viroj kaj virinoj, ĉiuj trinkantaj ion similan al akvo. Mi petis akvon, ili ne havis, bieron, ne, vinon ne, fine mi rezignis montri tion, kion trinkas la aliaj, sed ho ve, je la unua guto mi preskaŭ falis renverse, ŝajnis mi trinkas fajron, mi klopodis gustumi iomete, vane, mi ne kapablis, la ĉeestantoj mokis min, estis vodko farita el terpomoj, mi ege miris vidante ĉiujn, viroj kaj virinoj engluti la tutan enhavon de la glaso. Konklude mi revenis kun mia soifo.

Longan tempon poste mi konis la sekreton, por ne senti la brulon necesas rapide engluti la tutan enhavon de la glaso.

André Aude

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr